

HORIZON-TAAL

mei - juni 2020

Jaargang 52 - nummer 303



Esperanto kaj la kronviruso
Telegram: senpaga tujmesaĝilo

www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Ten geleide	3
Angolo en niaj vejnoj – imitinda evento en Bruĝo	4
Seminario en VUB pri interlingvistiko kaj planlingvoj	5
La Helsinki-iniciato por plurlingveco en la scienca komunikado	6
Opstap naar meertaligheid	7
Telegram: senpaga tujmesaĝilo tute en Esperanto!	9
Novaj beneluksaj novaĵkanalo kaj fotokanalo	11
Kronviruso	12
PIV-ido: vasta vortaro Esperanto-nederlanda	13
Krucvortenigmo	14
Dyslexie en Esperanto	15
Recenzo: Claudio Magris: La muzeo de milito	17
Internacia tago por elimino de rasa diskriminacio: UEA-ILEI-mesaĝo	18
Vivo de Zamenhof – ĉapitro 7	19

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond vzw

52ste jaargang mei-juni 2020. Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd.

Redactie: Piet Glorieux @ horizon.taal@esperanto.be www.esperanto.be/horizontaal

Tekstopmaak: Yves Nevelsteen yves.nevelsteen@gmail.com

Clubactiviteiten: Katja Lödör lodorkatja@skynet.be

Werken mee aan dit nummer: Petro Desmet', Andries Hovinga, Kris Panis, Kristin Tytgat e.a.

Administratie en verantwoordelijke uitgever

✉ Vlaamse Esperantobond vzw • Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen

☎ 03 234 34 00 @ financo@fel.esperanto.be www.esperanto.be/fel/nl

BE0419 028 122 • RPR Antwerpen • KBC: IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB

bpost: IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Abonnement: 30 euro per jaar (6 nummers)

Advertentietarieven:

	1-malig	3-malig*	6-malig*
1/1 pagina	257	625	1000
1/2 pagina	150	375	600
1/3 pagina	110	275	440
1/4 pagina	80	200	320
1/8 pagina	55	140	220
1/12 pagina	30	75	120

Alle prijzen zijn in euro.

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar
Btw-tarief van 21% op deze tarieven.

ANGOLO EN NIAJ VEJNOJ... IMITINDA EVENTO EN BRUÛO

Dimanĉon la 16an de februaro okazis interesa evento en Bruĝo. En la agrabla renkontiĝejo Hof van Water-
vliet Heidi Goes kaj Abel prizorgis programon kiu al-
proksimigis la publikon diversmaniere al Angolo. La
programo estis samtempe informa, distra kaj korvar-
miga. Unue Heidi mallonge prezentis la landon, pli
precize la izolitan provincon Kabinda kie Abel loĝas
kaj kie ŝia instru-agado okazas. Post la paŭzo sek-
vis poezi- kaj muzikprogramo. Heidi deklamis, kun
muzika akompano de Abel, pecojn el la esperantigita
poemaro “Bruno kaj ritmo” de Antonio Agostinho
Neto, la unua prezidanto de la sendependa Angolo.

Belega kombino, la sentplena deklamado kaj la fona
muziko de Abel. Poste estis la vico de Abel kiu sole kantis en diversaj lingvoj, plejparte en la portugala, la ĉefa
pontlingvo de Angolo, sed ankaŭ en kelkaj afrikaj lingvoj. La publiko ĝuis, kunkantante de tempo al tempo.
Resume, sukcesa evento kiu eĉ allogis kelkajn ne-esperantistojn. Imitinda!



Piet Glorieux

REIS NAAR JAPAN DANKZIJ ESPERANTO



Emiel Vanderfeesten en Ben Indestege zijn eind
vorig jaar naar Japan geweest. Ze hebben daarover
een voordracht gegeven in de Limburgse Esperanto-
club. De bedoeling was om de mensen te laten
kennismaken met de mogelijkheden van het
Esperanto via Pasporta Servo en Amikumu. De voor-
dracht werd daarom in het Nederlands gehouden. Er
waren meer dan 70 aanwezigen! Emiel en Ben wil-
len opnieuw naar Japan vertrekken vanaf 1 september
tot ongeveer 23 september. Ze plannen om daar het
Japana Esperanto Kongreso te kunnen meepikken
(20 tot 22 september). Geïnteresseerden die mee wil-
len gaan, kunnen zich bij hen aanmelden.

STEUN VOOR BENELUX-PROJECT

Het Benelux-congres 2019 in Charleroi was een succes, ook financieel. Tijdens de laatste algemene verga-
dering van APE (Association pour l'Espéranto – Waalse Esperantokoepel) werd daarom beslist dat de winst
zou worden besteed aan drie doeleinden: een derde gaat naar APE, een derde is bestemd voor toekomstige
Benelux-congressen en nog een derde (475 €) is bestemd voor de promotie van Esperanto in de Benelux.

Het geld zou beschikbaar zijn voor iemand in de Benelux die een project heeft voor de promotie van onze
taal. Elk initiatief dat meer bekendheid kan geven aan Esperanto in de Benelux komt ervoor in aanmer-
king: informatiestand, voordracht, betaalde advertentie op sociale media, verspreiding van een brochure over
Esperanto enz...

Heb je een idee, een project? Neem contact op met Valère Doumont (doumontvalere@yahoo.fr).

LA HELSINKI-INICIATO POR PLURLINGVECO EN LA SCIENCA KOMUNIKADO

Finnlando ne nur uzas universalajn kongresojn sed ankaŭ estas lulilo de alvoko pri multlingveco en la scienca komunikado. Ankaŭ vi kiel Esperantisto, havanta rajton je informoj pri sciencaj rezultoj, povas subskribi. Vidu www.helsinki-initiative.org/eo

Esplorado estas internacia. Tiel estu! Multlingveco vivtenas esploron kiu loke gravas! Ĝin protekti estas nia tasko! Disvastigi esplorrezultojn en via propra lingvo efikas. Tion ni subtenu! Interagi kun la socio kaj dividi scion ekster la kadrojn de la scienca komunumo estas grava. Tio subtenindas! La infrastrukturo por scienca komunikado en la diversaj naciaj lingvoj estas fragila. Ni ne rajtas perdi ĝin!

La subskribintoj de la Helsinki-iniciato por plurlingveco en la scienca komunikado subtenas la jenajn rekomendojn akceptendaj de politikistoj, universitatoj, esplorinstitucioj, institucioj sponsorantaj esploron, bibliotekoj kaj esploristoj.

1. Subteni la disvastigon de esplorrezultoj plene profite al la socio

- Certigu, ke esplorantoj ricevu rekompencojn por disvastigo de esplorrezultoj ekster la kadrojn de la scienca komunumo kaj por interagado kun la prizorgantoj de tradicio, kulturo kaj socia vivo.
- Certigu, ke ekzistu samrajta aliro al esplorbazita scio en multnombraj lingvoj.

2. Protekti la nacian infrastrukturon por la publikigo de loke grava esplorado

- Certigu, ke publikutilaj sciencaj revuoj kaj eldonejoj disponu kaj pri sufiĉaj rimedoj kaj pri la necesa subteno por povi garanti altan nivelon de kvalilkontrolo kaj honesteco en la esplorado.
- Certigu, ke naciaj sciencaj revuoj kaj eldonejoj disponu pri sufiĉe kontrolita kaj sekura maniero aliri Open Access [Liberan Aliron].

3. Subteni lingvan multspececon en la pritaksado kaj sponsorado de esplorado

- Certigu, ke pritakso de la kvalito de esplorkonferencoj fare de fakuloj okazu sen konsidero de la publikiga lingvo aŭ de la publikiga kanalo.



- Certigu, ke fakaj artikoloj kaj libroj en sistemoj de indeksodonanta pritaksado estu traktataj samrajte sen konsidero de la uzita lingvo.

La Helsinki-iniciato por plurlingveco en la scienca komunikado estas iniciata de Tieteellisten Seurain Valtuuskunta (TSV) [Federacio de Finnaj Asocioj de Sciencistoj], Tiedonjulkistamisen neuvottelukunta (TJNK) [Konsila komisiono pri informado al la publiko], Suomen tiedekustantajien liitto [Finna Asocio de Sciencaj Eldonistoj], Universitets- og høyskolerådet (UHR) [Norvega Konsilio pri Universitatoj kaj Altlernejoj] kaj projekto de COST [Eŭropa Kunlaboro en la kampoj de scienco kaj teknologio] “Eŭropa Reto por Esplorprijugado en Sociaj kaj Mensaj Sciencoj” (ENRESSH).

La kampanjo “In all languages” [en ĉiuj lingvoj] estas voksignalo al la politikistoj, universitatoj, esplorinstitucioj, institucioj sponsorantaj esploron, bibliotekoj kaj esploristoj subteni la plurlingvecon en la scienca komunikado. Partoprenu! Afiŝu ĉe Twitter kaj/ aŭ Facebook vian deklaron aŭ filmeton montranta vian subtenon por plurlingveco en la scienca komunikado, kompreneble kun la signo #InAllLanguages ĉe Twitter kaj la titolo “InAllLanguages” ĉe Facebook.

Tradukita de Peter Weide

Dit toont aan dat het mogelijk is om erg professionele dingen te realiseren door samenwerking tussen diverse specialisten, maar ook dat dit niet mogelijk is zonder geld. Amateurs doen en kunnen veel doen, maar een dergelijk project realiseren is alleen mogelijk door een groot aantal teams van grote, competente specialisten.

Ten slotte wil ik zeggen dat de bal nu in het kamp van de Esperantobeweging ligt. Het zou kunnen dat niemand zich nog bekommert om de resultaten en dat het een van de vele interessante maar niet direct belangrijke pogingen was om iets te veranderen aan het onderwijs. Ofwel zien wij, de beweging, het belang in van dit instrument dat indirect Esperanto kan introduceren in scholen. Het is geen Esperanto-onderwijs om de beweging te versterken, maar een hulpmiddel om het aanleren van vreemde talen te versnellen. Om die reden kan het relatief gemakkelijk ingang vinden in scholen, want we moeten de leidinggevendenden van scholen er niet van overtuigen om hun goedkeuring te geven aan dit leerobject – de meesten zullen direct inzien dat het een nuttig instrument is voor scholen. Anderzijds brengt men tijdens het werken met het materiaal ook een internationale samenwerking tot stand tussen kinderen rond taal. Door uitwisselingen en ontmoetingen brengen ze de aangeleerde materie in de praktijk, maar ze maken zich ook typische Esperantodoelen eigen zoals het samenwerken met anderen, en het vereist van de scholen ook dat ze ermee verdergaan, maar niet meer als opstap naar talen leren maar om met de wereld contacten te leggen. Dit is het contactadres voor MLA: www.lernu.net/eo/instruado

Het leermateriaal is nu volledig vertaald in acht talen en grotendeels in twee andere. Behalve vertalers binnen de partnerorganisaties van het project, bedanken we hartelijk de esperantisten-vrijwilligers die hielpen bij het vertalen van het materiaal in vier talen, meer dan in feite noodzakelijk was volgens het projectcontract. Een bijzondere dank zijn we verschuldigd aan Mariana Evlogieva, die de Bulgaarse projectpartner, de school in Vraca, bijstond omdat ze zelf niet kon instaan voor de vertaling van het materiaal en waar in dat geval voor een kwaliteitsvolle vertaling uit het Esperanto werd geopteerd. Het niveau van de vertaling naar het Bulgaars zou onvoldoende hoog geweest zijn indien het vertaald was geweest door niet-esperantisten uit het Engels.

Zlatko Tišljarić
(uit *Eŭropa Bulteno* n-ro 200, Februaro 2020)
(vertaling: Piet Glorieux)

GEZOCHT: ervaren Esperanto-gebruikers voor vertaling MLA-website

Bedoeling is dat we op relatief korte termijn de vertaling afwerken van de 'Multlingva Akcelilo'-website. Dit is een onderdeel van de website lernu.net (lernu.net/nl/instruado). Zoals je in bovenstaand artikel kan lezen, staat de website met het leermateriaal op punt en kan men die, indien vertaald, uitrollen naar scholen.

Het zou goed zijn mocht dit kunnen gebeuren voor de start van het nieuwe schooljaar.

Deze coronacrisistijden zijn misschien een opportuniteit, meer vrije tijd (?), om die taak versneld tot een goed einde te brengen. In principe kan iedere kandidaat-vertaler er op eigen houtje aan beginnen, maar liever dan het in verspreide slagorde te doen, denk ik dat het goed is dat er enige coördinatie is. Dit is niet alleen belangrijk voor de eenvormigheid van de vertaling maar ook voor het 'moreel van de vertaal-troep' – onderlinge aanmoediging bijvoorbeeld.

Ik verwelkom ook graag mensen met ervaring in de wereld van het basisonderwijs – zelfs niet-esperantisten, familie van, kennissen – die vertrouwd zijn met pedagogische terminologie. De site is immers bedoeld voor leerkrachten van het basisonderwijs. Ook mensen met een gemiddelde kennis van Esperanto maar vertrouwd met tekstrevisie mogen zich aanmelden.

Indien u kandidaat bent, gelieve contact op te nemen met mij: piet.glorieux@gmail.com.



Multaj esperantistoj malfidas Facebook, ĉar tiu firmao misuzas datumojn de siaj uzantoj. Tial iuj esperantistoj rifuzas uzi Facebook Messenger aŭ WhatsApp. La sola maniero “moderne” (per tujmesaĝilo) kun ili komuniki, estas do per Telegram.

Por mi persone gravas la plurplatformeco de tujmesaĝilo, ĉar (ekzemple) kiam mi venas hejmen, mi deponas mian kutiman androïdan poŝtelefonon por ŝargado kaj ekuzas alian nur per vifio, aŭ iPad, aŭ komputilon.

Ke eblas facile kaj rapide redakti mesaĝon post sendado tre plaĉas al mi, ĉar ofte mi mistajpas vorton. Kiam mi retbabilas per Messenger, ne eblas facile korekti tion. Necesas kopii, forigi kaj denove sendi mesaĝon. Malagrablas tio.

Ekde kiam mi uzas Telegram-grupojn por la eldonaj projektoj de Petro Desmet’ kaj Lode Van de Velde, nia kunlaboro estas multe pli strukturita kaj nia komunikado multe pliboniĝis.

Dum pasintjara Somera Esperanto-Studado en Slovakio, organizantoj uzis Telegram por ekzemple informi pri lastminutaj ŝanĝoj. Tiu grupo havas pli ol 100 membrojn. En la grupo Esperanto en Rhône-Alpes (regiono de Liono) estas 34 membroj. Ili tie diskutas, kiam renkontiĝi, ĉu vojaĝi kune al renkontiĝo, konigas fotojn ktp. Mi kreis tian grupon ankaŭ por La Verda Stelo kaj por Belga Esperanto-Federacio.

Ĉu ankaŭ vi volas provi Telegram? Informoj en Esperanto aperas en la retejo www.telegramo.org

Yves Nevelsteen

Kion vi povas fari per Telegram?



Konekti
de plej foraj lokoj.



Kunordigi
grupojn
ĝis 200 000 membroj.



Sinkronigi
viajn babilejojn
en ĉiuj viaj aparatoj.



Sendi
dosierojn
de ajna speco.



Ĉifri
personajn kaj komercajn
sekretojn.



Forigi
viajn mesaĝojn
per tempumilo.



Konservi
viajn aŭdvidaĵojn
en interreto.



Konstrui
viajn proprajn ilojn
per API.



Ĝui
prikomentadon
de viaj klientoj.

KRONVIRUSO

FILMETOJ EL LA TUTA MONDO PRI LA KRONVIRUSO



TEJO publikigis en sia retejo alvokon, en kiu ĝi petis, ke homoj sendu rakontojn pri la situacio en siaj landoj rilate al la kronviroza pandemio. Respondis dekoj da esperantistoj el plej diversaj partoj de la mondo. Ili rakontis pri la situacio en siaj landoj, kaj donis konsilojn, kion fari dum la restado hejme. Sed plej grave, esperantistoj donis grandan mesaĝon de espero. www.mallonge.net/kronviruso1

Ĉar la filmeto-kampanjo estis tiel sukcesa, TEJO kreis ankaŭ duan filmeton per la materialo kiun ili ricevis: www.mallonge.net/kronviruso2 En la dua epizodo de Esperantistoj kaj kronviruso, pli ol 30 homoj el 17 landoj rakontas pri kiel progresas la situacio rilate al la kronviruso – COVID-19 – kaj kiel ilia ĉiutaga vivo ŝanĝiĝis. La pandemio estas afero ne nur de publika sano; ĝi afekcias ĉiutagan vivon, laborkondiĉojn kaj en kelkaj landoj ĝi estas ankaŭ politika problemo.

SENPAGAJ LEGAĴOJ DUM LA KRONVIRUSA KRIZO

Ĉar tre multaj homoj en la mondo nun devas resti hejme pro la kronviruso, **Monato** regalias ilin per senpagaj ekzempleroj. En www.monato.be/pdf vi povas trovi la tri plej freŝajn numerojn en la formoj PDF (por grandaj ekranoj) kaj en la dosierformoj ePub kaj Mobipocket (por poŝtelefonoj kaj librolejloj). Ili kaptas la okazon por danki ĉiujn fidelajn abonantojn, ĉar nur danke al ilia multjara abonado eblas disdoni la revuon nun.

La unua numero de **Juna Amiko** 2020 1 estas libere elŝutebla en la paĝaro www.ilei.info; tiuj personoj, kiuj devas restadi hejme pro la pandemio povos legi kaj ĝui ĝin, kaj espereble emos aboni la revuon.

Pro la tutmonda krizo, kaŭzita de la kronviroza pandemio, **Eldonejo Libera** kune kun la aŭtoroj decidis senpage disponigi ĉiujn elektronikajn librojn de la eldonejo. Tiuj kiuj deziras, povos subteni la aŭtorojn per PayPal aŭ tra UEA (lvld-x). Vi ankaŭ povos skribi leteron al la aŭtoroj. Elŝutu ĉe: www.eldonejolibera.be

RETKUNVENOJ: EVENTA SERVO HELPAS

Per www.eventaservo.org/reta, la retejo kiu kunigas ĉiujn Esperanto-eventojn tutmonde, eblas ankaŭ vidi la kunvenojn kiuj okazas per interreto. Iuj kluboj uzas Zoom, aliaj Jitsi Meet aŭ Skype. Foje necesas antaŭanonci sin por ricevi la kodon, foje aperas la enirkodoj kaj eblas tuj aliĝi. Multaj esperantistoj tion faras nuntempe! La 14-an de aprilo aperis en Eventa Servo pli ol 70 tiaj kunvenoj. Ĉar retaj kunvenoj okazas en la tuta mondo, ne ĉiam estis facile ekscii kiam ekzakte – je kiu konkreta horo – la kunveno ekas. Tial nun eblas en Eventa Servo elekti horzonon. Estas agrabla plibonigo.

KRUCVORTENIGMO

Horizontale:


1. La kreinto de Esperanto.
9. Ni vidas per ĝi.
10. Bezon' trinki.
11. Vi kaj mi.
12. Ne vi.
13. Tio, kion aktoro devas perfekte scii.
16. La konsonantoj de "tago".
17. Kun multaj paĝoj (parolante pri libro).
18. Ni aŭdas per ĝi.
20. Tia, kia butero ekzemple.
23. Ne vira.
25. Deziros havi...
28. Vorteto povanta prezenti elekton.
29. Interne de.
30. Ekkria vorteto por atentigi, instigi...
31. En iu loko.
33. Li uzas duradan veturilon.

Solve en la sekva numero.

Tabelo: Claude Labetaa – difinoj: Claude Labetaa kaj Magdal.na Feifčov.

Vertikale:

1. Objekt' povanta teni pantalonon.
2. Ekhavi, ekzemple aĉetante.
3. La unua kaj lasta literoj de "manĝu".
4. Prepozicio uzata por iri eksteren.
5. Per tiu vorto, oni alvokas vin.
6. Finaĵo de verbo por futura ago.
7. Perdi el la memoro.
8. Surmura informilo el papero.
14. Antaŭ la naŭa.
15. Artikolo.
16. Li eniras ... la pordo.
17. Kvin minus tri.
18. Regula maniero aranĝi objektojn.
19. Adjektivo signifanta "el lano".
21. Iri al difinita loko.
22. Havigi al iu ion, kion oni posedas.
24. Kvarrada veturilo.
25. Tre juna infan'.
26. Malantaŭa part' de la kapo.
27. Refleksiva posesivo.
32. Interne de.



Solvej krucvorttenigmo Horizontal 302



ik een correspondentie cursus, wat voor mij de beste manier was om bij te leren. Geen schoolbord waar ik mijn onbekwaamheid moest tentoonspreiden, of waar ik tijd tekortkwam; niemand lachte mij uit omdat ik traag las en mijn vrouw verbeterde mijn taken. Die cursussen waren heel goed, snel haalde ik behoorlijke resultaten. Dyslexie is een taalhandicap, maar er is gebleken dat dyslectici met enige hulp zelfs goeie schrijvers kunnen worden. Toch is vreemde talen leren een groot probleem; slechte uitspraak en een rommelige spelling kunnen zelfs de meest gemotiveerde leerling doen mislukken. Nu was het zo dat voor het examen van die schriftelijke cursus een goede kennis van minstens één vreemde taal vereist was. Ik probeerde eerst Duits te leren, dan Engels, maar ontmoedigd heb ik uiteindelijk mijn rug gekeerd naar handboeken, schijven en cassettes en bij mezelf gezworen om nooit meer aan zo'n gekheid te beginnen.

Op een dag zag ik in een plaatselijke krant een aankondiging van een cursus Esperanto. Ik had horen zeggen dat je het gemakkelijk leert en dat men het uitspreekt zoals men het schrijft. Het was in elk geval niet vergelijkbaar met het Engels. Ik was zeer sceptisch, maar toch ging ik naar de informatieavond. Het bleek een interessant idee te zijn, helder en praktisch als een constructiespel, een soort LEGO. Het Esperanto had me in de ban. Ik kon zinnen maken met woorden die echt betekenis hadden, zonder uitzondering! Ik beweer niet dat ik of een andere dyslecticus Esperanto zonder problemen leert, maar het verschil met andere talen was enorm. Waarom had ik die zeer waardevolle taal niet vroeger leren kennen en geleerd? Waarom hadden mijn ouders en leraren me niet laten kennismaken met Esperanto? Zij waren allemaal op de hoogte van mijn handicap. Wat weten dyslectici over de kwaliteiten van Esperanto in het algemeen?

Na twee jaar studie vond ik een correspondent in Duitsland. Hij nodigde me samen met mijn echtgenote uit om tijdens de vakantie een week bij hen te verblijven. Met nogal wat twijfel aan onze taalkennis gingen we in op de uitnodiging. Wat een avontuur! Het was onze eerste autoreis naar het buitenland met alleen Esperanto en enkele noties Duits als taalkundige bagage. Tot dan toe had ik nog maar heel weinig Esperanto gesproken; lezen en schrijven is niet hetzelfde. Om die reden had ik contact gezocht met Poolse en Tsjechische esperantisten, zodat ik mijn spreekvaardigheid wat kon bijschaven vooraleer ik bij mijn Duitse vriend aankwam. In de mate van het mogelijke, met de hulp van een toverstokje, kon ik praten met Polen en Tsjechen, en daar waren we dan, enkele dagen later, bij het Duitse gezin. De reis was een echte triomf, dankzij Zamenhofs uitvinding.

Van dan af heb ik talrijke landen bezocht met behulp van Esperanto. Ik stelde vast dat de zinswendingen van esperantisten in de verschillende landen minder variatie vertonen dan de dialecten van de nationale talen. Naar mijn mening zou het bestaan van Esperanto moeten rondgaan als een lopend vuurtje. Waarom ook niet? De tendens naar globalisering via een nationale taal is een gevaarlijke evolutie. De taal en cultuur van onze ouders is een onschatbaar erfgoed, dat deel uitmaakt van onze identiteit. In talrijke landen, bijvoorbeeld in Zweden, moeten jongeren Engels kennen om bepaalde vakken te studeren. Op die manier wordt je eigen taal iets vreemds in je eigen land. Is dat geen onderdrukking van onze identiteit?

In het recente verleden kwam dyslexie weer onder de aandacht. In de basisschool zijn dyslectici dikwijls onbekwaam om een behoorlijk niveau te behalen in het Zweeds of het Engels, met als gevolg dat ze geen middelbaar onderwijs kunnen volgen. Op hogescholen is het lesmateriaal dikwijls uitsluitend in het Engels. In Zweden lijdt 3 à 8 procent van de bevolking aan dyslexie. Ik ga ervan uit dat dit percentage hetzelfde is in alle landen. Het is geen ziekte die men kan genezen met een operatie of een medische behandeling, maar het is een bepaalde competentie. Ik vergelijk dyslexie bijvoorbeeld met muziek, jazz, wiskunde of menselijk gedrag. Elke competentie kan worden verwaarloosd of verder ontwikkeld. Mijn ervaring zegt me dat Esperanto de beste hulp is voor dyslectici. Het is verbazend dat er tot op vandaag geen enkele studie of geen enkel rapport is gemaakt over de waarde van Esperanto voor zulke mensen. Enkel zoiets kan mijn uitspraken staven.

Voor een dyslecticus kan het Esperanto: 1) de leerproblemen verminderen en een onlogische spelling voorkomen; 2) meer zelfvertrouwen geven, een identiteit schenken en een weg tonen naar een opener wereld; 3) tijd vrijmaken voor de ontwikkeling van andere talenten; 4) de kennis van de moedertaal verbeteren. Kortom, voor dergelijke personen is Esperanto een serieuze zaak en niet enkel een eenvoudig tijdverdrijf, het is een troef.

Dankzij het bewezen nut van Esperanto voor dyslectici op het gebied van taal en meer in het bijzonder in het onderwijs, zal Esperanto meer erkenning krijgen. De Engelse methode "Springboard to languages" zal dat probleem aanpakken. Ik begrijp dat vooral niet-Engelstalige studenten er, in een meer en meer Engelstalige wereld, weinig voor voelen om hun eigen grammatica te leren. Esperanto zal de studie van een andere taal voor hen makkelijker maken.

*Hans Dahl
(vertaling: Piet Glorieux)*

ĝui la erudicion de la aŭtoro. La reviziado de Federico Gobbo perfekte enŝoviĝas en profesian eldonon. Kaj li aldonis valoran prezenton de la libro ĝuste por ni, esperantistoj, kiuj ne malproksimas de pacismaj utopioj. Fine, la bela kovrilo de la FEL-eldono samas al tiu originala, pri kio respondecas Valeria Miele.

Beletra defio

Post tralego de dudeko da recenzoj en pluraj lingvoj, ŝajnas, ke kelkaj kritikistoj trovis la verkon tro ambicia kaj longa, foje ankaŭ iom konfuza, ne malofte kun troa uzo de kliŝoj. Dume, la plimulto el ili taksis ĝin elstara, unika, poezia kaj fascina, enciklopedia (ne hazarde ĉiu recenzo fokusiĝas pri malsama epizodo kaj citas apartan frazon), pinto de

la eŭropa humanismo. Interalie, ĝi premiĝis kiel la plej bona libro de la jaro 2016 de la itala ĵurnalo *Il Corriere della Sera*.

Resume, rekomendinda libro por postulema leganto, preta akcepti beletran defion kaj dediĉi sufiĉe da tempo kaj energio al malkovro de pensiga juvelo. Ĝi meritas la penadon.

Javier Alcalde
el Monato 2019/12

Claudio Magris: La muzeo de milito. El la itala tradukis Carlo Minnaja. Redaktis Federico Gobbo. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2019. 296 paĝoj, kudre bindita. ISBN 978-9077-06662-1.

Prezo ĉe FEL: 35 eŭroj plus afranko.

HOMARANISMO

INTERNACIA TAGO POR ELIMINO DE RASA DISKRIMINACIO: UEA-ILEI-MESAĜO

La 21-a de marto estas la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio, ĉiujara aranĝo kiu atentigas pri la plago de rasismo. Ĉi-jare la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio fokusiĝas je la duonvoja pritakso de la Internacia Jardeko por Homoj de Afrika Deveno (2015-2025), kiun prizorgas la Konsilio pri Homaj Rajtoj, en Ĝenevo. La pritakso resumos la jaman progreson kaj vokos al plia agado.

Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, “Proksimume 200 milionoj da homoj, kiuj identigas sin kiel afrikdevenaj, loĝas en la Amerikoj. Multaj pliaj milionoj loĝas en aliaj mondopartoj, ekster la afrika kontinento.” Notas Unuiĝintaj Nacioj: “Ĉu kiel posteuloj de viktimoj de la transatlantika sklavokomercio, ĉu kiel pli lastatempaj enmigrintoj, afrikdevenaj personoj estas inter la plej malriĉaj kaj plej marĝenigitaj grupoj. Ili ankoraŭ havas limigitan aliron al bonkvalita edukado, sanservoj, loĝejoj kaj socia asekuro, kaj ilia nivelo de politika partopreno estas ofte malalta. Krome, afrikdevenaj personoj ne malofte suferas pro multflanka diskriminacio surbaze de aĝo, sekso, lingvo, religio, politika opinio, socia deveno, posedrajto, handikapo, naskiĝo, aŭ alia statuso.”

Universala Esperanto-Asocio, laŭ sia statuto, same ILEI, estas neŝanceble kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio, inkluzive de rasa diskriminacio. Fundamenta al ĝia kredo estas vizio de monda komunumo, kiu vivas en harmonio kaj reciproka kompreniĝo. La rapida ekspansio de la

Internacia Lingvo Esperanto en lastaj jaroj atestas pri la potenco de tiu vizio.

Laŭ la fondinto de Esperanto kaj ties movado por la paco, D-ro L. L. Zamenhof, en mesaĝo al la Universala Kongreso de la Rasoj en Londono, antaŭ pli ol cent jaroj, “La konfliktoj kiuj troviĝas inter la diversaj rasoj kaj popoloj estas la plej granda malbono kiu afliktas la homaron.” Tiu malbono de rasismo daŭre vivas, bredante malamon kaj nutrante malegalecon. Ni alvokas al homoj ĉie troviĝantaj, ke ili kuniĝu por konkeri tiun malbonon per la spirito de kompreniĝo, inkluzive de lingva kompreniĝo, inter popoloj kaj etnoj tra la tuta mondo.

Ni citu Mandela: “Edukado estas la plej potenca armilo, kiun oni povas uzi por ŝanĝi la mondon.” Ni instruistoj konstatas, ke la tasko estas nia. Kuraĝe antaŭen, karaj gekolegoj!

www.ilei.info





«...hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bologne-sur-Mer kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.»

Ludwik Zamenhof

Al ĉiuj homoj li sin turnos nun egale kiugentaj. Krom nacianoj, ili devus senti sin homaranoj. Tial “Homaranismo” estis la titolo de la broŝureto, presita sen aŭtora nomo en Peterburgo 1906. [2] Ĝi enhavis novan instruon pri la rilatoj inter hejmo, gento kaj homaro. Deklaro el dek du paragrafoj formis la kredaron. Antaŭparolo mallonga ĝin klarigis:

“La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiaro, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco, kaj justeco.”

La antaŭparolo aludis la sperton de l’ bulonja kongreso, kiel pruvon, ke tia frateco estas ebla. Ĝi tamen atentigis, ke oni ne devas intermiksi homaranismon kun esperantismo:

“Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto, kaj tamen kontraŭulo de la homaranismo.”

Nur tial Zamenhof ne publike subskribis la libreton, ĉar li volis eviti konfuzon. Tiu ŝajna malkuraĝo lin tre suferigis. En 1912 li publike formetis de si ĉiun oficialan rolon en la aferoj de Esperanto por gajni plenan liberecon, kaj de poste li metis sian nomon sur la novaj eldonoj de l’ broŝuro.

En Orienta Eŭropo ekzistas inter gentoj du ĉefaj elementoj de malsamo kaj malamo: lingvo kaj religio. Poloj estas katolikaj, Hebreoj izraelanaj; Letoj estas luteranaj, Rusoj ortodoksaj; Armenoj estas kristanaj, Tataroj mahometanaj. La diferencon gravigas ne nur aparta parolo, sed konkura kredo. En literaturo kaj eklezio kuncentriĝas la naciaj sentoj. Tial en punktaro Zamenhofa staras du ĉefaj partoj: unu lingva-politika, alia religia.

En sia hejma vivado ĉiu parolu sian gepatran lingvon laŭplaĉe, sed li ne trudu ĝin al homoj aligentaj, por ne ĝeni aŭ ofendi ilin. En okazo de kunveno li uzu neŭtralan esprimilon, kiel Esperanto. Kun siaj samkredantoj li sekvu tiujn religiajn morojn, kiujn li deziras tradicie aŭ elekte, sed kun homoj alikredaj li konduku nur laŭ tiu ĉi principo: “Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi”.

Same kiel, ĉe parola fako, internacia lingvo prezentas

tussen andere volksgemeenschappen, tussen Russen en Georgiërs, tussen Tataren en Armeniërs.

Een afschuwelijke aanblik. Wat een contrast met Boulogne! Zamenhof was er het hart van in en voelde het als zijn plicht om een nieuwe stap te zetten. Mensen moesten leren om zich te verdedigen tegen die listen. Zij moesten leren om zich vrij te maken van die haat, door die nutteloze rivaliteit te vermijden. Hetgeen hij aan de Hebreëen had voorgesteld onder de titel “Hilelismo”, zou hij nu ten dienste stellen van het grote publiek.

Hij zou zich nu richten tot alle mensen, ongeacht hun afkomst. Behalve lid van een bepaalde natie, moesten ze zich nu ook *homarano* [lid van de mensheid] voelen. “Homaranismo” was dan ook de titel van het boekje dat in 1906 in Sint-Petersburg werd gedrukt zonder auteursnaam. [2] Het bevatte een nieuwe leer over het verband tussen thuis, volksgemeenschap en mensheid. Een verklaring bestaande uit tien paragrafen vormde de kern van de leer. Een kort voorwoord maakte het duidelijk:

“Het homaranisme is een leer die mensen – zonder dat ze afstand moeten doen van hun natuurlijke vaderland, hun taal of hun geloofsgemeenschap – de mogelijkheid geeft om elk soort onwaarheid of tegenspraak in hun etnisch-godsdienstige principes te vermijden en om samen te leven met mensen van elke taal en godsdienst op een neutraal-menselijke basis, gegrond op principes van onderlinge broederlijkheid, gelijkwaardigheid en rechtvaardigheid.”

Het voorwoord zinspeelde op de ervaringen tijdens het congres in Boulogne, als het bewijs dat een dergelijke broederlijkheid mogelijk is. Maar het onderstreepte wel dat men homaranisme en esperantisme niet door elkaar mocht halen:

“Beide ideeën leunen nauw bij elkaar aan, maar zijn niet identiek. Men kan een uitmuntend esperantist zijn en toch tegenstander van het homaranisme.”

Dat was de enige reden waarom Zamenhof de brochure niet ondertekende: hij wou verwarring vermijden. Die ogenschijnlijke kleinmoedigheid kostte hem veel moeite. In 1912 deed hij publiek afstand van elke officiële functie in verband met Esperanto om zo volledig vrij te kunnen zijn, en van dan af zette hij zijn naam onder elke nieuwe uitgave van de brochure.

In Oost-Europa zijn er tussen volksgemeenschappen twee hoofdelementen die verschil en haat verklaren: taal en godsdienst. Polen zijn katholiek, Hebreëen israëlitisch; Letten zijn luthers, Russen orthodox; Armeniërs zijn christen, Tataren moslim. Niet alleen de verschillende talen maar dus ook de rivaliserende godsdiensten verscherpen die tegenstellingen. In literatuur en godsdienst concentreren zich de nationale gevoelens. Daarom bestaat het overzicht van Zamenhofs principes uit twee hoofddelen: een taalpolitiek en een godsdienstig.



sincero. Sur lasta paĝo de l' broŝuro staris preta respondaro por laŭvolaj aliĝantoj. Jenaj fakoj apartiĝas: hejmo, patrujo, gento devena, lingvo gepatra, lingvo persona, religio laŭkreda. Nur tia demandaro ebligus ĉiun diri plenan veron, ne perfidante suferantajn samgentanojn.

Gepatra lingvo Zamenhofa estis rusa, persona estis pola. Lia gento estis la hebrea, lia religio liberkreda. Tion li povus ja konfesi sur enskribilo homarana. Sed, se li metus tion sur pasporton imperian, li estus kalkulata tuj en unu partio nacia. Kun Rusoj, premantoj de Polujo, aŭ kun Poloj kontraŭ la Hebreoj.

Tial homarana formularo proponas ja modelon tre praktikan por estontaj demandaroj oficialaj de regna recenzado. Same preskaŭ ĉiuj dek du punktoj de l' broŝuro povas celi du efikojn. Unuflanke tuja gvido al konduto individua. Aliflanke rekta montro por leĝaro pli justa inter homoj. Dek kvar principoj noblaj de Wilson nur montris al regantaj diplomatoj tion, kion ili devus fari. Se falus la konsento, la principoj falus kune. Ŝiraĵoj de l' papero disflugus sur la tablo verda. Nacioj ilin kaptus, kaj ĉiu svingus sian pecon por justigi novan ekbatalon.

Dume, programo Zamenhofa povas tuj gvidi homojn, kaj influi poste leĝfarantojn. Liaj dek du punktoj povas semi nur pacigon: Rigardu la homaron kiel unu familion. Tiu idealo regu viajn agojn. Juĝu ian homon ne laŭ gento, sed laŭ agoj. Lando apartenas, ne al unu gento, sed al ĉiuj la loĝantoj. Ne trudu vian gentan lingvon, nek la kredon, al ceteraj homoj. Metu la nomon "homo" super la naciaj.

keln bruken en idee. In Galicië mocht de Joodse taal volgens de wet niet gebruikt worden als moedertaal in officiële documenten. Hebreeën moesten zich inschrijven als hetzij Pools-, Duits- of Oekraïenssprekend. Alleen op basis van hun godsdienst kon men de verschillende leden van de volksgemeenschappen tellen: Israëlieten = Hebreeën, rooms-katholieken = Polen, Grieks-katholieken = Oekraïners, protestanten = Duitsers. Zelfs zij die al lang voordien afstand namen van hun voorvaderlijk geloof, schreven zich in voor de telling onder de godsdienst van hun volksgemeenschap. Een louter volksgemeenschappelijke standpunt met een politiek-statistisch doel!

Om die reden voorzag Zamenhof een neutraal fundament met een opmerkelijke aandacht voor de officiële documenten: *homaranoj* moesten het gewoon worden om eerlijk te zijn. Op de laatste pagina van de brochure stond een formulier voor vrijwillige intekenaars. Er waren afzonderlijke rubrieken voor thuis, vaderland, afkomst, moedertaal, spreektaal, godsdienst. Enkel een dergelijk formulier zou het iedereen mogelijk maken om de waarheid te zeggen, zonder zijn lijdende volksgenoten te verraden.

Zamenhofs moedertaal was het Russisch, zijn gebruikstaal was het Pools. Hij behoorde tot de Hebreeuwse volksgemeenschap, en hij was qua godsdienst een agnost. Dat kon hij aangeven op het antwoordformulier. Maar als hij dit op zijn officieel paspoort zou laten noteren, dan zou hij direct tot een bepaalde volksgemeenschap worden gerekend. Tot de Russen, onderdrukkers van de Polen, of tot de Polen, tegenstanders van de Hebreeën.

Daarom suggereerde het homarano-antwoordformulier een erg praktisch model voor toekomstige officiële volkstellingsformulieren. Op dezelfde manier kunnen nagenoeg alle twaalf punten uit de brochure twee doelstellingen nastreven. Enerzijds een duidelijke leidraad zijn voor het persoonlijk gedrag. Anderzijds de richting aangeven naar een rechtvaardiger wetgeving. De veertien edele principes van Wilson [3] toonde enkel de heersende diplomaten wat zij zouden moeten doen. Als de consensus er niet meer was, zouden de principes mee teloorgaan. Het versnipperde papier zou uiteenwaaien op de onderhandelingstafel. Naties zouden het grijpen, en elkeen zou met zijn stukje zwaaien om een nieuwe aanval te verantwoorden.

Het programma van Zamenhof daarentegen kan mensen direct een richting wijzen en daarna wetgevers beïnvloeden. Zijn twaalf punten kunnen alleen maar tot verzoening leiden: aanzie de mensheid als één familie. Beoordeel een mens niet op basis van zijn afkomst, maar op basis van zijn daden. Een land behoort niet toe aan een bepaalde volksgemeenschap maar aan al zijn inwoners. Dring de taal van jouw gemeenschap of je geloof niet op aan de anderen. Plaats de naam "mens" boven zijn afkomst. Patriotisme betekent alleen maar ten dienste staan van de regionale gemeenschap van mensenbroeders, het betekent nooit het haten van de anderen. Taal is alleen maar een doel, geen middel. Gebruik een neutrale taal met mensen van een

BENELUKSA KONGRESO EN CHARLEROI

okazos 17 - 20 septembro 2020

Ni denove planas diversnivelejn kursojn, altnivelejn prelegojn, prezentojn, libroservon de FEL kaj Eldonejo Libera, ekskursoj ktp. La luksa kongresejo troviĝas tuj apud la stacidomo de Charleroi Sud; ege praktikas tio!

Plentempe, de ĵaŭdo ĝis dimanĉo inkl. loĝado kaj manĝoj: 235 EUR. Unutaga partopreno kun tagmanĝo kaj vespermanĝo: 50 EUR. Eblas partatempe partopreni. Diversaj ebloj kaj aldonoj aperas en la retejo. Bonvenon!



Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169, BE- 2060 Antwerpen, tel. 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be, www.esperanto.be

Belga Esperanto-Federacio (BEF): Kristin Tytgat, kristin.tytgat@skynet.be

ILEI-Belgio (Esperanto-leraars): Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, flandrio@hotmail.com

Verdaj Skoltoj

p/a Valère Doumont, Rue des Champs, 3 5060 Sambreville, tel.: 071 165 395 kaj 0485 517 552; info@verdajskoltoj.net - www.verdajskoltoj.net

Association pour l'Espéranto,

p/a Jean-Pol Sparenberg, Ruelle de Thuin 20, BE-6540 Lobbes, tel.: 0475 27 23 19, jpsparenberg@gmail.com

Esperantista Brusela Grupo vzw (EBG) sekretario: p/a Yves De Keyzer, Perkstraat 78, BE-1630 Linkebeek tel.: 0498 04 00 95; sekretario@esperantobruselo.org - www.esperantobruselo.org/nl
Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, BE-1640 Sint-Genesius-Rode

Esperanto Nederland, sekretaris, Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel.: +31 (0)50 5718842
sekretario@esperanto-nederland.nl
www.esperanto-nederland.nl/groepen

Hoofdkantoor van de Esperanto Wereldvereniging/Centra Officejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, tel.: +31(0)104 361 044, uea@co.uea.org - www.uea.org

Bestuursleden van FEL

Voorzitter: Ivo Vercammen

Voorzitter: Marc Cuffez

Secretaris: Ben Indestege

Penningmeester: Ella Strug

Bestuursleden: Piet Glorieux, Nicky Janssen, Eddy Van den Bosch en Johan Van Eenoo

Contactadressen in Vlaanderen

www.esperanto.be/groepen

ANTWERPEN

Esperanto-Antwerpen, p/a Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be
La Verda Stelo: Ella Strug (voorzitter)

BRUGGE

Paco kaj justeco, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, tel.: 050 67 51 78, heidi.goes@gmail.com

GENT

La Progreso, Katja Lödör, Peter Benoîtlaan 117, BE-9050 Gentbrugge, tel.: 09 230 16 77, gent@esperanto.be

KALMTHOUT

La Erikejo, Mireille Storms, Douglaslaan 14, BE-2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com

KORTRIJK

La Konkordo, Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201, BE-8610 Kortemark, tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com,
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, BE-8500 Kortrijk, tel.: 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com

LEUVEN

Esperanto 3000, Ivo Schenkel, Karekietenlaan 14, BE-3010 Kessel-Lo tel.: 016 89 04 80 kaj 0486 39 28 02 ivo.schenkel@telenet.be

LIMBURG

Limbörgse Esperantovereniging

Henri Schutters, Panhovenstraat 10, BE-3930 Peer, tel.: 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be

OOSTENDE

La Konko, Anne Brabant, anne.brabant@telenet.be
Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, flandrio@hotmail.be

ROESLARE / TIELT zie KORTRIJK

TIENEN

Esperanto Numismatiek Vereniging (ENA)

Info: Bert Boon, Merelhof 8, BE-3300 Tienen, tel. en fax: 0472 73 48 30 bert.boon@skynet.be

TURNHOUT

Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, BE-2300 Turnhout, tel.: 014 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be

www.esperanto.be/horizontaal

Giften vanaf 40,00 euro aan FEL komen in aanmerking voor belastingvermindering